

la naska fasko

Ĉiutaga ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto

Numero unu

2008-06-30

Lundo

Bonvenon al NASK!

Bonvenon en bela La Jolla, Kalifornio! Estas apenaŭ kredeble por mi ke ni jam komencas la duan jaron de NASK ĉe la Universitato de Kalifornio en San-diego.

Sen NASK, sen instruisto, kaj sen kurso vi kapablas lerni la gramatikon kaj vortprovizion de Esperanto; hejme vi povas esplori en interreto, legi librojn, kaj abonigi gazetojn; sen lingvo-komunumo vi povas membriĝi en loka, landa, aŭ tutmonda asocioj. Vi eĉ povas verki kaj traduki sen la helpo de kursaro. Kial, do, dediĉi viajn tempon, energion, kaj monon al NASK? Simple pro tio, ke ĉi tie vi povas kaj paroli, kaj aŭskulti la paroladon de aliaj, aktive, tuttage, kaj pri diversaj ĉiutagaj aferoj.

Parolu en Esperanto ĉie kaj pri ĉio. Ekzemple, en la manĝejo (“Kiel oni nomas tian supon en Esperanto?” “Kiel nomiĝas tiu ĉi legomo?” “Ĉu vi povus doni al mi iom da... mmm... kio estas tio en Esperanto?”). Ĉu estas facile? Tute ne... sed mi kredas ke vi ne pagis por havi facilajn semajnojn, sed por vere progresi.

Eble vi hezitas paroli en Esperanto. “Ho, mi ne bone parolas, mia prononco ne estas ĝusta, mi ne scias ĉiujn vortojn kiujn mi bezonas.” Sed atentu: oni lernas paroli per parolado. Vi faros kelkajn—eble eĉ multajn—erarojn. Ne gravas! Ne okazos mortpuno pro lingvo-eraroj. Ju pli vi parolos, des pli vi kapablos paroli. Mi promesas vin ke neniu ĉi tie parolas senerare, ĉu en Esperanto aŭ en la denaska lingvo.

Se vi ne komprenas ion, demandu. La instruistoj, Ellen, Hoss kaj Grant pretas helpi vin. Se vi ne scias kie vi devus esti aŭ kion vi devus fari, petu helpon. Kaj se dum la kurso vi ne estas kontenta aŭ feliĉa pri io, bonvolu diskuti tion kun ni. Ni provos fari por vi kion vi bezonas por via sukceso.

Ĝuu la belajn tagojn kaj noktojn ĉi tie en La Jolla, partoprenu la Esperanto-komunumon, kaj parolu, parolu, parolu.

—Lee MILLER

Welcome to NASK!

Welcome to beautiful La Jolla, California! It's hard for me to believe that we are already beginning the second year of NASK at UCSD.

Without NASK, without a teacher, and without a course you can learn the grammar and vocabulary of Esperanto; at home you can search the Internet, read books, and subscribe to periodicals; without a language community you can join local, national, or international associations. You can even write and translate without the help of a course. Why, then give your time, energy, and money for NASK? Simply because here you can both speak and listen to others speak, actively, all day long, and about many everyday topics.

Speak Esperanto everywhere and about everything. For example, in the dining hall (“What is the word for that soup in Esperanto?” “What's the name of this vegetable?” “Could you pass me some ... mm ... what is that in Esperanto?”) Is that easy? Not at all... but I don't think you paid for easy weeks here, but to make real progress.

Maybe you're hesitant to speak Esperanto. “I can't speak very well, my pronunciation isn't good, I don't know all the words I need.” Well, look: you learn to speak by speaking. You will make some—possibly even many—errors. That doesn't matter! There's no capital punishment for language errors. And the more you speak, the more you'll be able to speak. I can promise you that no one here has error-free speech, whether in Esperanto or in their first language.


If there's something you don't understand, ask. The instructors, Ellen, Hoss, and Grant are ready to help you. If you don't know where you should be or what you should do, ask for help. And if during the course you're not satisfied or not happy with something, please talk about it with us. We will try to do what you need for your success.

Enjoy the beautiful days and nights here in La Jolla, join in the Esperanto community, and speak, speak, speak.

—Lee MILLER

La NASKan Faskon redaktas via afabla helpinstruisto Hoss. Li *senpacience* kaj *avide* atendas viajn kontribuojn—ĉu fotojn, desegnojn, artikolojn, poemojn, amo-leterojn... aŭ ion ajn! Bonvolu sendi viajn materialojn perrete al <hoss@lodestone.org> aŭ perpiede al Asante #126. Kontribuoj devos alveni antaŭ la 7-a posttagmeze por aperi en la morgaŭa numero.

Kalembura kadro



Kalemburo estas vortludo en kiu oni mistranĉas vorton por trovi novan, neatenditan, kaj (espereble) amuzan signifon. Ekzemple, "amuzo" kaj "am-uzo."

Ĉiutage, nia lerta NASKano Simono KEITH prezentos desegnon pri iu kalemburo. Via defio estas: divenu la ĝustan vorton antaŭ morgaŭ! Tiam ni aperigos la solvon kune kun nova desegno.

Noto de Ellen...

Bonvenon al la 39a NASK kaj la dua jaro ĉe la Universitato de Kalifornio, San Diego. Mi esperas ke via vojaĝo al la universitato estis senproblema kaj vi nun estas preta ĝui nian malgrandan Esperantuĵon. Ni ĉiuj loĝas kune en la apartamentejo Asante kaj povas facile interkonatiĝi. Ni pli bone komprenas kiel funkcias la diversaj partoj de la tereno de UCSD do espereble povas krei kontentigan kaj neforgeseblan sperton por vi. Mi antaŭĝuas la okazon renkonti novajn lernantojn kaj saluti revenantajn NASKintojn.

Ni estas bonŝanca havi Hoss FIROOZANIA kiel helpinstruiston kaj redaktoron de la *NASKa Fasko* ĉar li spertis la programon ĉi tie lastjare. Li povas helpi vin kun viaj demandoj kaj mi volonte same faros. Se vi ne vidas min, metu noton sub la pordo de mia apartamento (Asante #124) kaj mi provos respondi kiel eble plej rapide. Plej grave: ĝuu la lokon, la lernadon kaj novajn geamikojn.

—Amike, Ellen M. EDDY

Noto de Hoss...

Estas granda honoro (kaj plezuro!) por mi ne nur partopreni en la kursaro ĉi-jare, sed ankaŭ kontribui al ĝi kiel helpinstruisto. Mi redaktas la *NASKan Faskon* kaj aranĝas programojn kaj ekskursojn por la tempo inter viaj klasoj: do... aferojn posttagmezajn, vesperajn, kaj semajnfinajn.

La *Fasko* estas por vi: **vijaj verkoj** igas ĝin interesa por ni ĉiuj kaj riĉigas nian komunan sperton ĉi tie. Mi kuraĝigas vin verki pri io ajn, kio interesas vin: viaj spertoj ĉi tie ĉe UCSD, viaj hobiaj, kaj viaj opinioj. Dividu kun ni viajn poemojn, ŝercojn, fotojn kaj desegnaĵojn. Ne gravas, ĉu vi estas komencanto aŭ spertulo: ĉiuj viaj kontribuoj estas bonvenaj, kaj mi feliĉe helpos vin, se vi volas. Bonvolu sendi viajn kontribuojn al mia retadreso, <hoss@lodestone.org> aŭ porti ilin al mia ĉambro, Asante #126.

—Redaktante via, Hoss FIROOZANIA

Nia ĉi-jara teamo:

- | | |
|----------------------|------------------------------|
| • Ellen EDDY | Administranto |
| • Lee MILLER | Instruisto—Post-baza nivelo |
| • Birke DOCKHORN | Instruisto—Progresiga nivelo |
| • Bertilo WENNERGREN | Instruisto—Supera nivelo |
| • Hoss FIROOZANIA | Helpinstruisto |
| • Grant GOODALL | Direktoro |

El la kalendaro:

| | hodiaŭ | mardo | merkredo | ĵaŭdo |
|--------------------------|----------------------------|-----------------------------|--------------------------------|----------------------------|
| matene | 9 atm–12 ptm: Enkonduko | 9 atm–12:20 ptm: klasoj | 9 atm–12:20 ptm: klasoj | 9 atm–12:20 ptm: klasoj |
| post- tagmeze | 2 – 5 ptm: Klasoj | libera | Lusi kaj Stelet' prezentos? | ekskurso: glisilejo |
| vespere | libera | 7 ptm: Interkona Vespero | libera | ? |

Ĉu la mistera majstro revenas?

De la redaktoro: Ĝus antaŭ ol mi finpretigis la *Faskon*, mistere aperis—ŝajne el nenie—krude ŝirita paperpeceto kun la jena poemo. Strange, ĉu ne?

Falas teren brila sun'
el nebulplena blu'.
Tiel venas tag-aŭtun'
por igi ke ne plu

kaŝu sin soleca lun';
Inspira nokt-influ'
tie ĉi ekestu nun
kaj restu kiel glu'.

—Aĉjo

Por ricevi poŝtaĵojn

Vi povas ricevi leterojn kaj pakojn ĉe la konferenco-centro (kie vi ricevis viajn ŝlosilojn). Donu la suban adreson al viaj amikoj, kaj poste kontrolu en la konferenco-centro—tie oni metos sciigon se vi ricevos poŝtaĵon.



Vizitu la salonon!

Venu, vidu, diboĉu! (Nu, eble ne tro...) Ĉi-jare ni havas propran komunan ĉambron en *Cuzco* (ĵus apud *Asante*). Tie vi trovos komfortajn seĝojn kaj eĉ video-telefonon, per kiu ni parolos kun Esperantistoj el ĉirkaŭ la mondo. La ĉambro estos malfermita ĉiutage inter la **1-a kaj la 10-a p.t.m.**

Kiel atingi la Interreton?

Se vi volas uzi vian komputilon sendrate en via ĉambro, aĉetu \$10-permesilon ĉe la konferenco-centro. Se vi volas uzi ĝin sendrate en la resto de la universitato (en la klasĉambroj, en la biblioteko, ktp), petu pasvorton de Grant post mardo.

Cetere, vi povas trovi multajn ret-konektitajn komputilojn tra la universitato: en la konferenco-centro estas unu. Aliaj estas en la lingvo-laboratorio kaj en la biblioteko *Geisel*.

Kutimaj klasĉambroj kaj horoj

Hodiaŭ ni iris al la klasoj malfrue pro la matena enkonduko. Ekde morgaŭ (mardon) ni komencos sekvi nian kutiman horaron por la kursaro:

| Kurso | Horo | Instruisto | Ĉambro |
|--------------|-------------|-------------------|---------------|
| 5BS | 9:00-12:20 | Lee | HSS 2150 |
| 5DS | 9:00-12:20 | Birke | HSS 2305B |
| 12S | 9:00-12:20 | Bertilo | HSS 2333A |